# TEA-BULTENO

4ª JARO | MAJO 2001 | NUMERO 5

## AGENDO

1 **M** **Sidejo fermita**
2 M
3 Ĵ
4 V Prikongresaj laboroj
5 S
**6 D**
7 L
8 M Ordigo de TEA-arkivo
9 M
10 Ĵ
11 V BERNAJ ALPOJ
12 S
**13 D**
14 L
15 M Ordigo de TEA-arkivo
16 M
17 Ĵ
18 V Prikongresaj laboroj
19 S
**20 D**
21 L
22 M Ordigo de TEA-arkivo
23 M
24 Ĵ
25 V Prikongresaj laboroj
26 S
**27 D**
28 L
29 M Ordigo de TEA-arkivo
30 M
31 Ĵ

## TRIESTO 2001


Fulmrapide pasas tagoj, semajnoj kaj monatoj, ĉefe por tiuj kiuj estas okupataj pri organiz-laboroj por nia nacia evento. Tial ni rekomendas al tiuj, kiuj intencas ĉeesti la 70an **Italan Kongreson**, haste aliĝi, rezervi tranoktejon, mendi ekskursojn ktp, ĉar kutime lastminuta servo ne ĉiam sukcesas kontentigi malfruajn aliĝantojn.

Kelkaj ŝanĝoj estos farataj en la programo, tial se vi havas retan kunligon, de tempo al tempo rigardu ĝin ĉe http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html - ni klopodos ke ĝi estu daŭre ĝisdata!

Aliĝis jam pluraj eksterlandanoj: el Aŭstrio, Belgio, Britio, Francio, Hispanio, Kroatio, Slovenio ktp, eĉ el Brazilo, Japanio kaj Usono, do, feliĉe nia kongreso estos NE NUR NACIA, SED ANKAŬ INTERNACIA! Nu, ne facilos krokodili - ni havos la bonŝancon paroli, diskuti, kvereli, amuziĝi, kunkanti Esperante!

Se ĉio ĉi allogas vin, ne tro atendu: tuj kontaktu nin!

*rete* testudo@adriacom.it - nored@tiscalinet.it
*telefone* 040763244 - 040763128
*poŝte* TEA - C.P. 601 - IT-34100 Trieste




Okaze de la 56ª Kongreso, organizita, de la 15ª ĝis la 17ª de aprilo, de SAT-AMIKARO en Chambery, Francio, estis faritaj specialaj stampo kaj glumarko. En ambaŭ aperas elefanta kapo. Ĝi elvokas la faman kaj karakterizan fontanon de la Elefantoj, konstruitan en 1838: ĝi estas kurioza monumento starigita memore de la Grafo de Boigne, grava urbo-bonfarinto.




La poŝtoficejo Stráznice, distrikto Hodonin, uzadis/os de la 2ª de aprilo ĝis la 19ª de majo 2001 afrankmaŝinstamp-

ilon okaze de la 53ª IFEF-Kongreso. Tiun internacian kongreson de Fervojistoj aŭspicios la ĝenerala direktoro de Ĉeĥaj fervojoj. La bildo reprezentas lokomotivon "tipo 312.2" el la jaroj 1868-71, kiu veturadis tra Tábor, la ĉijara kongresa urbo. Jam konataj la aŭtoroj: inĝ. ark. Karel Kuĉa kaj s-ro Karel Pavlíĉek.
Pluajn informojn donas:

Esperanto - Poŝtkesto 36 - CZ-696 62 Stráznice

**Rid Angulo**

La sonorilo sonoras. La edzo diras al la edzino: "Certe estas la najbaro, kiu petos ion prunte. Tio ĝenas min, ĉefe ĉar li neniam redonas la pruntitaĵojn. Ĉi-foje mi nenion pruntos." Kaj kolere, li malfermas la pordon.
"Bonan matenon" diras la najbaro "Mi dezirus scii, ĉu vi posttagmeze bezonos la motorciklon."
"Certe, ĉar mi devos forvojaĝi kun mia edzino" respondis la edzo.
"Bonege! Divenite!! Trafe! Do, vi lasos hejme la aŭtomobilon. Ĉu vi pruntos ĝin al mi?"

Ŝu esperantisto demandis al loka pramisto, ĉu tiu akompanus lin per boato al iomete malproksima insulo, por ĉeesti U.K-on.
Dum la pramado, la esperantisto "ekzamenis" la boatiston: "Ĉu vi scias, kiu estas Zamenhof?"
"Ne" respondis la boatisto.
"Ha, duono de vivo perdita" komentis la esperantisto.
"Kaj, kiu estas Kalocsay?"
"Ne" respondis la boatisto.
"Ha, duono de vivo perdita" komentis la esperantisto, kiu daŭrigis samteme kaj samkomente dum la boatado.
Je certa momento, komenciĝis mara ŝtormo, kaj la boato enlasis akvon. "Ĉu vi scias naĝi?" demandis la boatisto.
"Neeeee, tute neeeee" hurlis la esperantisto.
"La tuta vivo perdita" diris la boatisto, saltante en la maron.

## Verku studon pri historio de UEA en la 70aj jaroj!

Por ke venontaj generacioj povu bone informiĝi pri la problemoj de la Esperanto-movado en la 1970-aj jaroj, la studgrupo PERSPEKTIVO volas stimuli per konkurso la verkadon de studoj pri tiu periodo. La kvin plej bonaj studoj pri la influoj de tiuj problemoj sur la tiaman funkciadon de UEA ricevos premion de 500, resp. 400, 300, 200 kaj 100 USD danke al pluraj personoj, ĉefe la japana mecenato Etsuo Miyoŝi.

La temo de la konkursaĵoj estu "Universala Esperanto-Asocio en la periodo 1970-1980". Ili ampleksu inter 10 kaj 50 paĝoj; la teksto estu Esperantlingva kaj klare legebla. Eblas partopreni individue aŭ kolektive, sed oni donu klaran indikon pri tio. La konkursaĵoj atingu FLANDRAN ESPERANTO-LIGON (Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio) antaŭ la 1ª de oktobro 2001.

La verkinto uzu kaŝnomon kaj en aparta koverto estu indikitaj la vera nomo kaj adreso. Tri kvalifikitaj personoj (po unu nome de PERSPEKTIVO, s-ano Miyoŝi kaj UEA) pritaksos la verkojn per poentoj. La sekretario de PERSPEKTIVO redaktos la rezulton laŭ la poentumo kaj indikos la laŭreatojn. La studgrupo PERSPEKTIVO rajtos publikigi ĉiujn senditaĵojn.

Pliaj informoj riceveblas ĉe la membroj de PERSPEKTIVO; retpoŝte ĉe la kasisto: <alhu@xs4all.be>. Aktivuloj el la periodo 1970-80 estas petataj, se ili ne mem konkursos, disponigi sciojn kaj dokumentojn al partoprenemuloj. La prezidanto de la studgrupo estas d-ro Wim M.A. De Smet (Hertendreef 12, BE-2920 Kalmthout, Belgio - tel. +32 3 666 99 49) kaj la honora prezidanto, la Nobelpremiito prof-ro Reinhard Selten.

[Gazetara komuniko de UEA, n-ro 119]

Naskiĝis antaŭnelonge **nova retgrupo** kun aparta devizo: "**diskuti malmulte, agi multe kaj rapide**" - Utiligi la reton por atentigi pri okazaĵoj, proponi agadojn, interveni tuj. Ankaŭ te-saloneto nature, precipe por bonvenigi novulojn, sed ĉefe labora kunsidejo.
La grupo serĉas kontaktojn kun grupoj samcelaj kaj sammetodaj por interŝanĝo de spertoj, rimedoj kaj komunaj agadoj. Bonvenon al samideanoj de bona volo! Por aliĝi esperantisti-italiani-subscribe@yahoogroups.com
La iniciatinto: Giorgio Bronzetti gbronzetti@infinito.it

## Prave aŭ malprave, jen interesa *dekalogo*

La dek plej oftaj eraroj dum informado pri Esperanto:

1. Diri, ke Esperanto estas lingvo universala anstataŭ lingvo INTERnacia.
2. Paroli pri problemo "de la plurlingveco" anstataŭ "de la lingva baro".
3. Troa persona kulto de Zamenhof: Majstro, skulptaĵoj, disdonado de fotoj ktp...
4. Atakemaj aŭ altrudemaj sloganoj. Ekzemple: "Dua lingvo por ĈIUJ".
5. Uzo de politikecaj aŭ religiecaj simboloj: verda stelo, himno, flago...
6. Uzo de politikecaj vortoj: -ist, movado, propagando, samideano, fina venko, -ista junularo.
7. Uzi la x-metodon por skribi ekzemplajn frazojn.
8. Troigi.
9. Neglekto de la ekstera aspekto de la informanto.
10. Nomi informadon/varbadon pri Esperanto "propagando".

*Fonto: http://internacialingvo.ini.hu*

### Informoj pri Most ankaŭ en Esperanto

Jam ekde februaro nordbohemia urbo Most (Ĉeĥio) havas siajn oficialajn paĝojn ĉe http://www.mumost.cz ankaŭ en Esperanto danke al laboro de lokaj esperantistoj. La paĝo aperas unue ĉeĥlingve, sed dekstr-angule videblas angla kaj germana flagetoj kaj la simbolo de Esperanto, per kiuj oni aliras al la respektivaj lingvaj versioj. Most estas la unua ĉeĥa urbo, kies oficialaj TTT-paĝoj estas tradukitaj ankaŭ Esperanten.
La aŭtorino de la paĝoj, Jana Zambová, kiu ne estas esperantistino, estis surprizita, ke al ŝia adreso venis pluraj gratuloj (zampova@mumost.cz).

*Inf. Miroslav Malovec starto@clavis.cz*

**Parte, inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO.**

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
Tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349